manko de spiriteco oni vivas en la etoso venenigita de agresemo, de malfavoreco, de malkaŝita enviemo, de blasfemado estanta nepra vorta garnaĵo de ĉiuj socitavoloj, de ŝtelado el laborejoj kaj kutime el ĉieloke, de apaĉeco kaj fine de senlima ebrieco transformanta homojn en animalojn - alivorte, la spirita ekologio ankaŭ troviĝas ĉe la limo de pereo.

Ambaŭ ekologiaj statoj de homa vivmedio - ĉu natura, ĉu spirita - estas reciproke influeblaj: sendiskutebla estas tio, ke la kultura nivelo de homa socio ege influas ĝian industrian evoluon, same kiel la industria evoluo favoras la plialtigon de kultura nivelo. La danĝero konsistas nur en tio, ke ne rompiĝu inter ili la kongrua konformeco, ke ne deproksimiĝu la distanco inter ili - ja estas klare kiaj sekvas la rezultoj...

Kiel atingi tiun harmonian kunfunkciadon de ambaŭ flankoj de homa civilizacio? Ni trovos la respondon laŭ la malnova recepto: se estas konata la kaŭzo de malsano, do estas kuracebla la malsano mem. Ni evidentigis ke en la bazo de homa kulturo, de industria kaj de naturprotektado kuŝas la spiriteco de homa socia evoluo, ĉu la ekologian staton de ĉirkaŭanta medio, do la tuta atento devas esti direktata al la kultivado de tiu faktoro. Neniu intensigo, per industriaj rimedoj, korekti la ekologian situacion por savi la difektiĝantan naturon estos efikaj, se tiun korektadon efektivigos kulture misedukitaj homoj, kiuj laŭ sia senspiriteco neeviteble vanigos sian penon. La plialtigo de spirita potencialo, la kreskigo de kultura nivelo devas esti la dominanta adiciato de la homara evoluo. Ne la teĥnika ekiparo, ne la socia industriiĝo devas tiri post si la malantaŭiĝintan kulturon, sed la kulturo mem devas movi, antaŭenpuŝi la teĥnikan progreson. Nur kiam la kulturo fariĝos la motoro de la homara evoluo, tiam ne nur pli perfekte progresos la homa socio mem, sed ankaŭ ĉesos suferi la ĉirkaŭanta medio, ĉar la kultura homo neniel kapablas difekti sian naturan hejmon. Do, nur la spiriteco savos la nunan malsanan socion kaj ĝian medion, nur la racio savos la mondon.

Viktor Ivanoviĉ KISELEV
Instituto geologia de Akademio de Sciencoj de Taĝikio
ul. Razina 5, kv. 1
GUS 734005 DUŜANBE - TAĜIKIO

Hanibalo, la kartaga militestro

Gerhard KALKHOF (DE)

1. La komenca historio de Kartago (814 aK - 509 aK)

Allogis Mediteraneo jam en la frua antikva epoko iujn popolojn, tie navigi, ĉar la situo de ĉi tiu maro inter la kontinentoj Azio, Afriko kaj Eŭropo favorigis la ŝipiradon sen iaj rimedoj (kiel kompaso aŭ sekstanto). La tiamaj ŝipirantaj popoloj orientis sin laŭ la bordolinioj kun ĝiaj promontoroj, aŭ singarde velante, remante de insulo al insulo, ĝuste kiel tio necesis por tranoktado; ĉar la naviguloj ne ŝatis la mallumon sur la maro.

Estis nek egiptoj nek la mezopotamiaj popoloj, kiuj riskis aventurajn ŝipveturojn malgraŭ ilia alta kulturstato, sed semidaj popoloj, rekte lokiĝantaj al la orienta bordo de la maro, precipe en hodiaŭa Libano. Distingiĝis de aliaj popoloj la fenikoj. Elirante de sia ĉefurbo Tiruso (Tyros), ili traveturis ne nur Mediteraneon ĝis ĝia okcidenta fino, sed ankaŭ Atlantikon, velante laŭ la Afrika bordo (ĝis la golfo de Gineo) kaj norden al Britujo; tio okazis jam dum la 12a ĝis la 9a jarcento aK. Ili ja ne kontentiĝis je aventuraj veturadoj, kontraŭe ili persekutis alian celon. Ĉar ili estis lertaj komercistoj, ili serĉis oportune situantajn lokojn, por komerci kun la ĉirkaŭaj popoloj, kaj ĉie ili fondis faktoriojn, tiel al la bordoj de norda Afriko kaj Hispanio, sed ankaŭ sur la insuloj, precipe Sicilio.

Inter ĉiuj tiuj urbaj kaj komercaj establaĵoj unu elstariĝis (krom Tiruso, la origina urbo), fondita verŝajne dum la 8a jarcento en nuna Tunizio, proksime de la ĉefurbo Tunizo. Laŭ legendo ĝin fondis en 814 la reĝidino Dido, forpelita el Tiruso (Arkeologoj fiksas la fondadon je ĉirkaŭ 750 aK.). La "Nova urbo" - tion signifas la fenika nomo Kharthdaŝt - prosperis tiom forte, ke baldaŭ ĝi konkuris kun la grekoj, kiuj ankaŭ navigante kaj komercante strebis al hegemonio en la okcidenta Mediteraneo.

Batalante kun ili alterne en venkado kaj malvenkado, Kartago tie fakte akiris hegemonion, post kiam ĝi konkeris la okcidentan parton de Sicilio kaj la tutan Sardinion (ĉ. 550/40). Aliancante kun la etruskoj, loĝantaj ĉe la okcidenta bordo de meza Italio, Kartago

venkobatis la grekan ŝiparon ĉe Aleria sur la insulo Korsiko (535). De tiam la urbo fakte regis la tutan okcidentan Mediteraneon, ne ĝenite de la grekoj.

Sed je tiu tempo nova kontraŭulo ekestis en la urbo Romo, kiu strebis al potencfarado. Tamen Kartago ne timis tian urbon, ĉar ĝiaj ŝipoj estis pli bone ekipitaj kaj armitaj ol la romanaj. Surbaze de tio ekestis unua kontrakto inter Kartago kaj Romo (509 aK), kiu malpermesis al Kartago fondi faktoriojn sur la itala bordo; la Mediteraneon ĝi regis kiel antaŭe. Romio ne interesiĝis pri la maro; ĝi sole volis regi resp. konkeri la italan landon.

2. La Kartaganoj kaj la Romanoj ĝis post la 1-a Punika Milito (509 - 225 aK)

Nur ŝajne daŭris la paca periodo de komerco kaj navigado. Precipe Sicilio fokusiĝis, elpeli Kartagon. Tie regis en diversaj urboj opresemaj, perfortemaj memregantoj, nomitaj tiranoj, tiel en Sirakuzo (Syrakus), Akragas aŭ Himera, kiuj sentis sin forte ĝenataj rilate al komerco kaj regado. Tiam unuiĝis la siciliaj grekoj, komandataj de la tiranoj Gelon de Sirakuzo kaj Teron de Himera, kaj venkis marbatale la kartagan ŝiparon ĉe Himera (480). Tamen Kartago refortiĝis, kaj devigis la grekajn urbotiranojn, agnoski la kartagan landlimon, kiu separis la okcidentan, kartagan regionon (397 aK). Certe poste tirano Agatokleso de Sirakuso ne kontentiĝis premegi ĉi tiun kartagan insulparton sed eĉ transmariĝi al la urbo Kartago mem (310). Sed ĝin konkeri li malsukcesis. Fine li reŝipis, postlasante nevenkeblan, florantan urbon, ĉirkaŭita de paradizeca lando, enviita de la grekoj.

Ŝanĝiĝis tute la afero, kiam la Romanoj interesiĝis pri Sicilio, kie la grekaj tiranoj militis unu kontraŭ la alia, sed ankaŭ kontraŭ la kartaganoj. Tiuj estis por la Romanoj osto en la gorĝo. La konstantan, sed sensukcesan bataletadon de la grek-siciliaj tiranoj ili uzis por kontraŭi la kartaganojn, kiujn ili nomis Punikoj (derivata de greka phoinikoj). Aliancinte kun Sirakuzo en 264/63 ili komencis militiron - la unua punika milito (laŭ la roma historiisto Titus Livius).

Sed kiel venki la terurajn Punikojn, kies ŝiparo estis preskaŭ ne superigebla, des pli multe ĉar ili estis tute nespertaj kaj je navigado kaj je arto konstrui ŝipojn? Se ili iam bezonis ŝipojn, tiuj estis pruntepreniitaj de aliancitoj, eble por transporti truparon de la firmtero al Sicilio. Feliĉe ili trovis kartagan militoŝipon alstrandiĝintan. Laŭ tiu modelo ili konstruis cent penterojn kaj dudek trierojn. Krome ili inventis novaĵon, kiu tute ŝanĝis la taktikon de la marmilito. Ĝis tiam marmilitestroj celis, sinkigi la malamikajn ŝipojn, batrompante ilin. Tio sukcesis per dika kaj forta fersprono, fiksita al la ŝippruo, kiu sin boris al la flanko de la kontraŭula ŝipo. Tiu nun, batrompite, sinkis, kaj la ŝipanaro ofte devis mizere droni.

La instalaĵo, inventita de la Romanoj, konsistis el longa (je ĉ. 6 klaftoj = 8 m) eskalo, transverse surnajlita per bretoj, 4 futoj (= 1,3 m) longaj. Ĝi estis tenata vertikale al masto, staranta sur la prua ferdeko. Super pulio, troviĝanta al la mastpinto, ruliĝis ŝnurego, firmligita al la ekstera finaĵo de la eskalo per ferringo. Al tiu finaĵo estis ankaŭ pintigita feraĵo. Dum la ŝipveturado nun tiu eskalo supreniĝis laŭ la masto. Sed kiam la marbatalo ekestis kaj oni proksimiĝis al kontraŭula ŝipo, ĝi estis faligita sur ties ferdekon, kie ĝi hokiĝis firme (per sia hakilsimilaĵo), kaj la militistoj sturmis super ĝi sur la alian ŝipon, kie ili batalis per siaj glavoj. Tiel la Romanoj ŝanĝis la militon maran al tera laŭ sia kutimo.

Baldaŭ okazo realiĝis, kiam denove la siciliaj tiranlandoj militiris - Sirakuzo asistita de Kartago kontraŭ Mesino, kiun Romio subtenis, sendante trupojn. Ĝi ne nur liberigis la urbon Mesino sed ankaŭ marŝis kontraŭ aliaj, komencante per tio la militon, nomatan la 1-a Punika (264 aK). Tiam Romo riskis la marmiliton per la konstruado de la ĉi indikitaj penteroj kaj trieroj, ekipitaj kun la nova instalaĵo. Per tio ĝi unue venkis la kartagan ŝiparon ĉe Mileo [Mylae], proksime de Mesino (260). Tamen la fortuno ŝanĝis la partiojn. Kelkfoje Kartago batis la Romanojn, favorate de ŝtormoj, kiuj pereigis la romajn ŝiparojn, alifoje ili devis cedi, ĝis kiam la batalo de la Egataj Insuloj [Aegates insulae] ĉe la okcidenta bordo de Sicilio decidis la militon per grandioza marvenko de la Romanoj

(241 aK). Tio devigis Kartagon cedi Sicilion kaj pagi enorman tributon.

Sekvis el tiu malvenko dua katastrofo por Kartago, kiam la kartaga truparo sur Sicilio devis rezigni je sia soldo okaze de la reiro al Kartago. Ili ribelis kontraŭ siaj oficiroj, postulante la soldon rifuzitan, kaj eĉ minacis la urbon je militiro, ekmarŝante de la antaŭurbo Tunizo.

En tiu situacio de plej granda danĝero multsperta kartagano engaĝiĝis pri sia urbo, la nobelo Hamilkar Barkas. Li savis ĝin kun numida soldataro, venkante kaj masakrante la ribelantaron (238 aK).

Certe Hamilkaro povis ĝui tiun venkon, tamen ne kiel nobelo; ĉar regis lian patran urbon la komercistoj, monavide en ĉiuj siaj negocaj aferoj. Sed li faris kiel ĉefa stratego kaj politikisto dum la longjara sicilia militiro, farante la packontrakton kun la obstinaj Romanoj.

Nun ricevinte altan reputacion, li pretiĝis savi sian urbon, prematan finance per la pacaj kontribucioj, kaj pagi la soldatojn el sia propra kaso, al kiu la kartaga konsilantaro kompreneble konsentis.

Tamen ne estas imageble, ke li estis riĉega. Sed li plenigis sian kason, transirante al Hispanio. Jam de longe tie ekzistis komercaj faktorioj de Kartago, ties teritorion li plivastigis. Krome la duoninsulo posedis multajn riĉfontojn je stano kaj arĝento, kiujn tute li eluzis por financi siajn entreprenojn kaj pagi la armeon. Li fondis novajn urbojn - ankaŭ kiel fortikaĵojn. Ĉar la originaj triboj estis tre militemaj, kaj li devis perforte ilin superigi. Dum militiro kontraŭ la Oretanoj al la fontejo de la rivero Baits [lat. Baetis, hisp. Guadalquivir] li estis mortigita de malamika lanco (229 aK).

Per tio ne ekestis fino de la kartaga regno. Kontraŭe lia familio daŭrigis la pligrandigadon laŭsisteme. Lin sekvis sia bofilo Hasdrubalo, kiu jam sub Hamilkaro estis vicestro, subtenante sian bopatron. La regnon li pliperfektigis, ekspluatis ĉiujn minejojn kaj ankaŭ alimaniere eluzis la tutan landon Hispanio; li tie regis kiel reĝo super sia propraĵo. La triboj unuiĝis sub lia gvidado, kaj post kiam li edziĝis kun filino de tribestro, ili proklamis lin sia militestro.

La amasigataj riĉaĵoj ebligis al li kolonii la landon tute laŭ la kartaga maniero. Fine li fondis ĉefurbon (228/27), grandioze ekipitan, kiun li nomis Nova Kartago [Cartagena], Ĝi ekestis en loko, kie antaŭe ekzistis la nun detruita Mastia kaj fariĝis eminenta haveno kaj fortikaĵo.

Tiun evoluadon tute ne ŝatis la Romanoj. Militon ili ne povis riski, atakite de keltoj en norda Italujo. Por forigi la kartagan influon en norda Hispanio (trans la rivero Ibero [Ebro]), ili traktis kun Hasdrubalo la tiel nomatan Ibero-kontrakton en 226, laŭ kiu la sud-ibera parto estis nure kartaga, sed la norda parto ne estis regata de la Kartaganoj. Precipe ili ne rajtis transiri la riveron por militirado.

Malgraŭ tiu restrikto de la potenco, Kartago kaj ĝiaj transmaraj posedaĵoj prosperis nome en Hispanio, ĉar ĝi ĉiam preferis la komercon, kiu ne estis restriktata laŭ la kontrakto. Ĝia komerca imperio super la okcidenta Mediteraneo eĉ estis konfirmata en la kontrakto, sole la militado submetiĝis je la kontrakto. La kartaga registaro laŭkutime ne estis militema, neglektis la aferon, kaj rigardis suspekteme al Hispanio, kie Hasdrubalo regis preskaŭ aŭtokrate. Tio venĝiĝu poste amare!

Certe la familio Barkas personiĝis en Hasdrubalo, la nekronata reĝo de Hispanio. Neniu sciis, kion lia cerbo planis, ĉu eble militiro kontraŭ Romo trans la Ibero? Ĵus, je tiuj decidoriĉaj jaroj, eble rezultantaj militon, malfeliĉa bato trafis la Hispano-Kartaganoj; Hasdrubalo estis murdita en sia propra domo de sia kelta sklavo, laŭdire pro venĝo (221 aK).

3. La juna Hanibalo kaj sia familio

Per tiu fatala afero turniĝis la evoluo inter Kartaganoj kaj Romanoj draste, ne per tio ke la hispano-kartagana estraro eble fariĝis sengvida, sed per la elekto de nova reganto. Tuj post la murdo de Hasdrubalo estis elektita kaj proklamita la juna Hanibalo, bofrato de Hasdrubalo kaj filo de Hamilkaro.

Antaŭ ol la decidogravaj jaroj, nun sekvintaj, estas alrigardataj, eble licu priskribi Hanibalon laŭpersone kaj el sia familia vidpunkto.

Li devenis el la familio Barkas, kiu signifas "fulmo". Ĉi tiu familio apartenis al la kartaga nobelaro kaj vidis sian originon laŭ sageo en Dido, la fondintino de Kartago.

La patro Hamilkaro, jam ĉi indikita, distingiĝinta dum la Unua Punika Milito, havis tri filojn: Hanibalo [Hannibal], Hasdrubalo kaj Mago. Eble ankaŭ ekzistis filinoj, kiuj ne estas konataj same kiel lia edzino.

Hanibalo, la unuenaskita, venis en la mondon en 247 aK (aŭ eble en 246). Konsekrite al la plej alta punika Dio Ba'al, li ricevis la nomon Khenu Ba'al, signifanta graco aŭ donaco de Ba'al, poste transformita latine al Hannibal. Kompreneble la patro edukis siajn filojn al militistoj kaj enkondukis ilin en ĉiuj artoj de militado. Kaj jam frue li ekkonis la estrajn kapablojn de sia unuenaskito.

Kiel reprezentanto de sia patra urbo je la fino respektive ĉe la packontrakto de la 1-a Punika Milito, la patro Hamilkaro devis ekscii, kiamaniere la Romanoj strebis obstine kaj persiste subigi Kartagon. Tial li sentis profunde ĝis la ostoj malinklinon kontraŭ ilin. Ne estas mirinde, ke li instigis siajn filojn, kontraŭstari aŭ eĉ malami ĉiun romecon.

Estas raportite, ke Hamilkaro tuj post sia transiro al Hispanio, akompanite de sia familio, igis ĵuri sian naŭjaran filon Hanibalo, ĉiam malami la Romanojn; tio okazis vid-al-vide de ĉiuj oficiroj antaŭ la altaro de la dia Ba'alo.

Ĉu prave aŭ nur legende, tamen estas fakto ke Hanibalo neniam perdis el siaj okuloj, ĉie kaj ĉiel malutili la Romanojn kaj rompi ties potencemon super sia urbo Kartago. El tiu sintenado rezultas ĉiu malamikeco kaj abomeno kontraŭ la Romanoj. Ĉu tiu homo vere sentis malamon aŭ perfortecon en sia koro, tio estas dubeble. Almenaŭ ne estas imputebla al li, ke li intencis perei Romon.

4. Hanibalo kaj sia militiro kontraŭ la Romanoj

a) Sagunto kaj la komenciĝinta milito

La fatala situacio, en kiun Kartago englitiĝis, rezultis ne sole el la roma potencstrebado, sed ankaŭ el tio, ke tiuj pensis Hanibalon tro juna kaj vere nesperta, spiti al ili, des pli multe ĉar en Kartago la

registaro favoris alian militestron, la ambician Hano [Hanno], kiu volis ekskludi Hanibalon.

Tial Hanibalo devis esti atentema pri li kaj same atendi, kiel la Romanoj agus. Ĉiu okaze li vidis la danĝeran situacion; li parte atendis kaj parte faris sian propran planon kiel militi - ĉio, por montri al la Romanoj sian militan potencon.

Ekflamiĝis la milito ĉe la urbo Sagunto, situanta ĉe la marbordo ĉ. 150 km sude de la enfluejo de la rivero Ibero [Ebro]. Kvankam ĝi do troviĝis en la kartaga influzono, parto de la senato staris ĉe la flanko de Romo, alia apogis la kartagan partion. Ĉiuokaze ĝi dispartiĝis, kaj la roma partio, instigite de la Romo mem, riskis la ribelon kontraŭ Kartago resp. Hanibalo. Tiu rapidpaŝe sieĝis, konkeris kaj detruis la urbon, kiu devis perei, strange ne helpite de siaj romanaj aliancanoj. Inside kaj ruze tiuj agis tiamaniere, por kulpigi Hanibalon kiel kruelan kaj perfortan militestron. Ĉar tuj post la falo de Sagunto ili enmiksiĝis, postulante la enmanigon de Hanibalo kiel pacrompanto, por puni lin.

Kompreneble la kartaganoj rifuzis tion fari, kaj responde Romo nun deklaris la militon (219 aK). Pretekste tiu direktiĝis nur kontraŭ Hanibalo, kiu intertempe transiris la Iberon kaj per tio rompis la Ibero-kontrakton de 226.

Laŭ la roma agado dum la pasinta (1-a Punika) milito oni devis atendi en Kartago, ke la Romanoj intencis agresi rekte la urbon per invado en Afriko - en hodiaŭa Tunizio - kaj eble eĉ okupi Hispanion. Efektive tiu plano ekzistis. Ĉar nun Kartago marmiliton ne plu povis riski, Hanibalo evoluigis tute novan strategion: tiu estis, Romon ataki ekde la dorsoflanko, invadante Italion en la norda parto, kie loĝis keltaj triboj, kontraŭstarantaj al la Romanoj.

b) La transiro de la Alpoj kaj la itala invado

Kiam Hanibalo rapidpaŝe marŝis tra la regiono norde de Ibero kaj sammaniere pasis super la Pireneoj al suda Gallio, Romo devige ŝanĝis sian projekton, direktitan kontraŭ Kartago. La konsulo Publius Cornelius major (la pli aĝa) estis sendita por devigi Hanibalon al batalo. Pro tio li albordiĝis ĉe Massilia, la greka urbo ĉe la enfluejo de la rivero Rodano [Rhône], alianciĝinta kun Romo.

Sed Hanibalo jam troviĝis ĉe la norda parto de la rivero, kiun li transiris per ruzo, ĉar la keltoj tie malhelpis lin, kaj li aŭdacis danĝeran manovron. Scipio, ne sciante la hanibalan marŝprojekton transiri la Alpojn malgraŭ komenciĝanta malfavora sezono (aŭgusto), retiriĝis sen ia sukceso, invadante Hispanion, kie la frato de Hanibalo, Hasdrubalo, regis.

Neŝanceliĝante, Hanibalo marŝis rekte al la Alpoj. Li, kiu jam pli frue montriĝis kiel genia kaj ekzemplodona kondukisto, riskis streĉitan marŝadon super la plej altaj montoj. Kontraŭstaris ne sole nekonata, dezerta regiono, sed ankaŭ lia neordigita, parte nefidinda armeo. Por kompletigi ĉiun malbonon, la keltaj triboj, precipe la alobrogoj, malhelpis kaj atakis la soldatojn, eĉ ĉe montpintoj kaj antaŭ abismoj.

La armeo, konsistanta el 38.000 piedosoldatoj, 8.000 rajdistoj kaj - ho miro - 38 elefantoj, marŝis laŭ la valo de la rivero Isara [Isère], poste alten laŭ la rivero Ark [Arc], - kaj atingis fine en kulmina alteco transpasejon, hodiaŭ nomata *Col du Clapin*; bivako estis starigita, kaj la soldatoj sentis sin senŝarĝitaj de ĉiuj suferitaj penegadoj. La grandioza alpa pejzaĝo impresis ilin, kiuj konis nur varman, senneĝan landon. Hanibalo montris al la alia, la orienta flanko de la montaro, al la ebenaĵo de la rivero Paduo [Pado = Po], kiu etendiĝis antaŭ iliaj piedoj: la celo de la giganta marŝado.

Jam la ascendo inkluzivis grandajn danĝerojn: mallarĝaj, krudaj padoj, konsistantaj el malfirma ŝtonetaro, glitigis homojn kaj bestojn, kiuj mortfalis en profundajn abismojn. Kaskadantaj torentoj baris la vojon, ŝveliĝante kaj muĝegante kiel monstroj de la infero; neĝo kaj glacio frostigis la homojn, kiuj konis nur la agrablaĵojn de la mediteranea klimato.

Pleje suferis la elefantoj, kiuj brave tenis sin dank' al la zorgo de la militestro. Kelkfoje malamikaj montotriboj surprizis ilin, sed Hanibalo superregis ilin. Malsato regis, ĉar la nutraĵa provizado ne plu daŭris aŭ perdiĝis. Sed Hanibalo montriĝis en tiu mizera situacio kiel elstara prizorganto. Ĉie li estis, liaj okuloj atentis ĉie, ĉe ĉiu soldato. Tiel li kunfandis sian armeon, amata kaj altestimata de ĉiu.

Plimalfaciliĝis kaj plidanĝeriĝis la descendo. Ĉar la orienta alpoflanko estis pli kruta kaj pli sulkigita ol la okcidenta. Freŝfalinta neĝo subite devigis la marŝantojn, malrapidege kaj nur singarde serĉi la ĝustan vojon sur glacihava tereno. Diluvecaj pluvoverŝoj kontraŭe staris, la zorgeme gardataj elefantoj ofte estis glite transportataj sur trabstabloj.

Kiam la hanibala armeo post penpena marŝado de nur 15 tagoj atingis la urbon Taŭrasio [Torino], ĝi estis tute elĉerpita, malfortigita kun granda perdo da homoj, bestoj kaj ekipaĵo. 18.000 da piedmilitistoj, 2.000 rajdistoj kaj 17 elefantoj restis survoje kiel kadavroj.

c) **La grandaj batalegoj**

Oni ja devus sin demandi, kiom valoris ĉi tiu riska entrepreno, provokita sole de Hanibalo mem. Ĉu eble li agis tute nesingarde aŭ eĉ freneze? Sed oni ne konas lin, kiu sagace antaŭvidis. Ĉar per sia agado li kaŭzis jenon: unue la Romanoj estis tute surprizitaj; atakite ĉe ilia plej vundebla parto, ili vidis la militon portita en sian propran landon; ili devis defendi ĝin kontraŭ malindulga malamiko; due la keltaj triboj, loĝantaj en norda Italujo, ne estis kunigeblaj kun ili; male la Romanoj devis atendi, ke tiuj alianciĝis kun Hanibalo.

Fakte, ili pravis. Sen granda peno Hanibalo povis konvinki tiujn, alianciĝi kun li kaj militi kontraŭ la malamataj Romanoj. Tiel li trafis du celojn per unu ŝtono: nome, la keltoj, apogante lin, transmetiĝis je 19.000 militistoj, inkluzive 5.000 rajdistoj, kaj ankaŭ prizorgis lin je nutraĵo kaj armilaro.

Nur mallonge daŭris ripozado, kiun li eluzis por kutimigi per ekzercoj la keltan truparon al sia batalordo. Kaj jam la roma armeo, deĵoranta en la padua ebenaĵo kaj komandata de P. Cornelius Scipio, pretiĝis al batalo. La rivero Ticinus [Ticino] estis la trafloko, kie Romo ricevis sian unuan malvenkon; por Hanibalo nur afereto! Laŭnombre certe lia armeo estis pli granda, sed la rajdistaro decidis la finon de la unua bataliro, kaj la konsulo estis forte vundita.

Nun la batita roma armeo retiriĝis suden, proksime de la rivero Trebia, lokita ĉe la nuna urbo Cremona, kie ĝi atendis la freŝan armeon, venintan el Sicilio kaj gviditan de la dua konsulo Tiberius

Sempronius Longus. Tiu volis venĝi la honton faritan de Hanibalo al sia patrujo.

Kvankam vintriĝis kaj la vetero malfavorigis la batalon, li atakis la kartagan armeon mallonge post la vintra solstico, sed kontraŭ la konsilo de sia kolego Scipio. Irinte tra la malvarmega riverakvo, la Romanoj marŝis en rigida ordo kontraŭ la malamikoj. Sed tiuj cedis en sia mezo kaj impetis la flankon. La rajdistaro, aperanta el embusko, malordigis la tutan vastan roman linion. La legianoj, ĝis nun nevenkeblaj, serĉis sian savon fuĝante. Nebulo kaj neĝoblovado, malklarigantaj la fruan tagforiron, certigis la duan roman milito-katastrofon.

Sed vane Romo atendis, ke Hanibalo marŝos suden en la koron de la roma regno. Li volis ripozigi kaj refreŝigi sian armeon. Kiel signo de lia celo, rompi sole la roman potencon kaj liberigi la italajn tribojn, li sendis la kaptitojn ne-romajn en ilian hejmecan landon.

Kiam la printempo de 217 aK proksimiĝis, li ekmarŝis. La Apeninan Montaron li superpaŝis direkte en la valon de la rivero Arno. Tiu, inundata je neĝodegelado kaj forta pluvoverŝado, malebligis bonaŭguran venkopasadon. La tuta regiono ŝanĝiĝis al marĉejo. La soldatoj malsaniĝis, ĉiuj elefantoj mortis, escepte unu, kaj la militestro mem forte suferis je okula inflamo; eĉ blindiĝis la okulo. Li tiom malsaniĝis kaj malfortiĝis, ke liaj kunestroj timis pri lia vivo. En palankeno li devis esti portata.

Intertempe la ekaperanta printempo denove favorigis Hanibalon, kiu baldaŭ resaniĝis kaj uzis sian strategian talenton pretigi novan militbaton. Tiu okazis ĉe la Trasimena Lago proksime de la urbo Perusia [nun : Perugia]. Ĉar en Romo du novaj konsuloj estis elektitaj - Gaius Flaminius kaj Servilius Geminus -, kiuj marŝis renkonte al li, ne sciante kie li troviĝis. Sed Hanibalo sciis ilian marŝdirekton, kiu kondukis laŭ ĉi tiu lago. Tie, en la arbarkovritaj deklivoj laŭlonge de la strato, li kaŝis la truparon, atendante la roman armeon.

Je la mateno de la 23a de junio (217 aK) tiu marŝis laŭ la lagostrato senzorge kaj ne sciante la danĝeron. Pro la malvarmego

la legianoj estis formetintaj siajn kaskojn, en ilia mezo la konsulo Flaminius, klare distingiĝanta per sia ruĝa mantelo.

Nun plenhajle impetis el la arbaro la Kartaganoj sur la Romanojn, kiuj apenaŭ povis defendi sin; plensurprize ili batalis, soldato kontraŭ soldato, senespere, vidalvide de la morto. La masakrado finiĝis je la morto de 15.000 legianoj, 16.000 da ili submetiĝis. Hanibalo perdis nur 1.500 soldatojn. La 30 mortigitaj senatanoj ricevis plenhonestan sepulton, sed la kadavro de la konsulo ne estis trovita.

Kiel post la batalo de la Trebia tiel ankaŭ nun Hanibalo donis liberecon al ĉiuj ne-romaj legianoj. Per tio li volis ligi al si la loĝantaron. Sed li devis ekkoni, ke des pli proksime al la roma centro li venis, ju pli fidelaj ĉiuj vilaĝanoj kaj urbanoj sin tenis al la roma regno. Do, vidante maleblon konkeri ĉiun lokon, li tramarŝis la mezan parton de la duoninsulo, ĝis kiam li atingis la Adriatikan Maron. De tie li sendis mesaĝon al Kartago.

La restantan jaron li nenion entreprenis. Sole li reorganizis sian armeon, atendante plendecidan turniĝon, per kiu li volis trudi pacon al la orgojla Romo. Tiu ankaŭ strebis decidon, tial ĝi rekrutis grandan armeon, laŭtakse je 80.000 soldatoj, kiuj estis ekipitaj je ĉiu disponebla armilaro. Hanibalo disponis pri 50.000. En la vintrobivako ambaŭ armeoj kontraŭstaris.

Tiel la jaro 216 aK alvenis, grandsorta kaj la plej malforta, kiun spertu Romo dum sia tuta, longa historio. La konsuloj de ĉi tiu jaro C. Terentius Varro kaj L. Aemilius Paulus prenis novan bivakon apud la grava urbo Kanno [Cannae], kie Hanibalo jam troviĝis. Ambaŭ armeoj etendiĝis al la tiea rivero Aŭfidus [nuna : Ofanto], atendante pri decido.

Ĉar la du romaj konsuloj alterniĝis de unu tago al la alia ĉefkomandi, Hanibalo serĉis inciti, kiu el ili ekbatus. Paulus hezitis, sed Varro - tio estis la sekvinta tago, la 2an de aŭgusto - starigis, ardante je batalemo, la armeon antaŭ bivako sur la dekstra riverbordo, preta atake superregi la Kartaganojn.

Tio vere plaĉis al Hanibalo, ĉar tia ago konformis al lia grandruza plano. En longa linio li starigis sian truparon kontraŭ la triobla roma, tiamaniere ke la dekstra alo estis formita de la leĝera

kavalerio, komandata de generalo Hanno; la meza parto, konsistanta el keltoj, hispanoj kaj libianoj, volbiĝis antaŭen direkte al la Romanoj kurbetforme sub lia propra komando. La maldekstra alo konsistis el la peza kavalerio sub la komando de Hasdrubalo.

Lia plano plene sukcesis: ĉar konsulo Varro atakis per tuta sia maso la infanterion en la mezo, kiu cedis sed ne tro. Dum tio la maldekstra kartaga alo impetis antaŭen, cedigis unue la kontraŭan roman alon de konsulo Aemilius Paulus, turniĝis al la centro, tiamaniere atakante la Romanojn dorsflanke. Kvazaŭ prenite en tenajlo, la romaj legianoj batalis kontraŭ ĉiuj flankoj; nur la batalantoj de la unua linio povis defendi sin per glavo kaj lanco; tiuj de la mezo estis ĝenataj.

Tiel okazis granda ĥaoso, sole malmulte da ili povis savi sin, inter ili Varro, la konsulo. Lia kolego Paulus mortis. La tuta roma armeo estis neniigita. El la 80.000 legianoj 50.000 perdis sian vivon, inter ili preskaŭ ĉiuj oficiroj. Kontraste al tio la kartaga partio havis sole 5.000 mortintojn. Hanibalo nun estis la triumfanta venkisto, al kiu tuta la roma lando malfirmiĝis, ĉar ĝi ne plu posedis ian armeon. Lamentado kaj vekriado plenigis Romon de limo al limo. Ankaŭ post multe da jaroj la Romanoj nomis tiun tagon de la 2a de aŭg. en 216 aK "dies ater" (la nigra tago).

d) **La jaroj post Kaneo**

Konsekvence de ĉi tiu roma katastrofo atendebliĝis, ke Hanibalo marŝos kontraŭ la urbo Romo kaj konkeros ĝin. Sed - ho, kia miraklo - li ne agis tiamaniere. Certe li delegis sian konfidenculon Kartalo tien por intertrakti armisticon, sed el la muroj la malfortaj urbogardistoj moke rezistis dirante, ke ili batalus ĝismorte, sed neniam kapitulacus. Ankaŭ la senato rifuzis kapitulacon, verŝajne sciante la maleblon de la Kartaganoj pri kompleta venko. Do ili persistis obstine kaj daŭre. Senkompromise ili atendis, ĝis kiam Hanibalo elĉerpiĝis militire kaj nutroprovize.

Sed ankaŭ Hanibalo persistis. Kuraĝigite de la venko ĉe Kanno, li atendis helpon de Kartago mem. Somere de 215 estis senditaj al li elefantoj kaj mono, por ke li povu varbi soldatojn. Samtempe lia generalo Hanno prenis la havenurbojn Lokroi kaj Kroton.

Tamen li ne sukcesis tiom, kiom necesus por daŭre regi mezan Italion. La tiean pejzaĝon Kampanio li gajnis nur parte, la urbo Nola rezistis kontraŭ li. Same la situacio evoluis en la sudo, en Apulio, kie nur unuopaj lokoj enmaniĝis al li.

Tiam alia projekto ekfunkciis, kiam li turnis sin al ekster-italaj aferoj. Nome reĝo Filipo de Makedonio fariĝis lia aliancano. Tiu, vidante la roman malfortecon, serĉis regajni sian teritorion en Ilirio resp. Dalmatio, kiun li perdis antaŭe al Romo, kvankam Filipo vidis sian profiton per la alianco, li povis subteni Hanibalon - almenaŭ laŭ ties aspekto.

Ankaŭ Sicilio ofertis bonaspekte. Ĉar reĝo Hiero de Sirakuzo mortis kaj lia filo Hieronimo volis interpaktiĝi, sed post ties murdo (213) tiu afero nuliĝis. Tamen la aŭspicioj favoriĝis: ĉe la sudpinto de Apulio Hanibalo gajnis la urbon Tarento, romaj atakoj kontraŭ siciliaj urboj malsukcesis, kaj ĉe Herakleia Minoa (sur Sicilio) deŝipiĝis granda kartaga armeo, konsistanta el 28.000 soldatoj inkluzive 3.000 rajdistoj kaj 28 elefantoj kun Himilko kiel komandanto.

De tiam - dum vintro 213/12 - la feliĉo forlasis Hanibalon. Ĉar sur Sicilio Sirakuzo fariĝis predo de la Romanoj. Scipio minor, jam dum jaroj sukcese vagante Hispanion, kaptis Sagunton; kelkaj grekaj urboj intertraktis kun Romo. Finfine pestilenco malfortigis la kartagan armeon. La urbo Kapua, grava loko en la hanibala strategio, estis rekonkerita de Romo, kvankam Hanibalo provis eviti tion, kaj la enloĝantoj estis kruele punitaj pro ilia obstina rezistado, laŭ la Romanoj ili ja agis perfide.

Tiel Hanibalo devis cedi paŝon post paŝo. Unu urbo post la alia falis en la manojn de Romo (ekz. Salapia, Herdoneae, Tarento). Liaj aliancanoj malfidiĝis, kaj la armeo malfortiĝis pli kaj pli. Lia sola zorgo koncentriĝis teni la okupitajn lokojn kaj resti nevenkebla dank' al sia militestra genio. Koleriĝis li kontraŭ ĉiu romeco masakrante, brulante kaj dezertigante. Izolite li batalis por sia postvivado en Italio, neglektate de sia patrourbo Kartago.

Ĉar aliaj batalejoj fokusiĝis. Ĥaoso etendiĝis en Sicilio. La substratego Hanno certe obstine rezistis, sed lia generalo Mutinis dizertis post kverelo, evidente kaŭzata de tiu, kun sia truparo al la

Romanoj. En Hispanio la juna Scipio, uzante dispartigadon inter Hasdrubalo, frato de Hanibalo, kaj generalo Giskon, gajnis preskaŭ la tutan landon kaj konkeris la ĉefurbon Novkartago [Cartagena]. Batalo, riskata de Hasdrubalo ĉe Baecula por regajni la bonan reputacion de sia familio, fariĝis fiasko. Liaj rivalaj generaloj rifuzis la subtenon.

Laste nun Hanibalo povis triumfi, kiam venkoj ĉe Lokroi kaj Bantia montris lian persistemon; la Romanoj ne nur devis cedi, sed ankaŭ la konsuloj ekforiĝis: unu, Marcellus estis mortigita, kaj lia kolego Crispinus estis forte lezita (209 aK). Tiun roman malfeliĉon eluzis lia frato Hasdrubalo, marŝis el Hispanio trans la alpoj por asisti lin. Sed al la rivero Metaŭrus la novaj konsuloj kontraŭstariĝis al li, kiu perdis ne sole la batalon sed ankaŭ sian kapon. Tiun, detranĉite, oni prezentis al Hanibalo, kiu nun vidis nur malbonan aŭguron (205).

Fakte, de tiam Hanibalo ne plu povis influi la militan sinsekvon. Ekde nun lia plej eminenta kontraŭulo ekdistingiĝis: P. Cornelius Scipio minor, ĝis nun nur kelkfoje ekfunkciiĝinta. Tiu, fervore lerninta la militarton de Hanibalo, transformis la roman batalordon. La centurio nun fariĝis memstara, adaptigebla al ĉiu batala movo; tiel ĝi povis distingiĝi per plej fleksema ordo.

Post kiam Scipio finvenkis la kartaganojn en Hispanio kun la falo de Novkartago, li reiris al Romo kaj, gajninte la konsulecon (205), li insistis antau la senato, ke la milito devus daŭri en Afriko mem, celante al la konkerado de la urbo Kartago.

Eble la senato vidis Scipion kiel savanto; Romo estis vere elĉerpita; ekzistis neniu familio, kiu ne perdis ian membron. Ĉiu deziris finon de la terura milito. Kaj nun tiu Scipio povis pruvi sian glorforton. Tial la senato permesis ĉi tiun militiron.

Tamen Scipio ne tiel feliĉiĝis, kiel li esperis. Ĉar alia Hasdrubalo, filo de Giskon, ne nur koncentris la kartagan truparon, sed ankaŭ aliancis kun Sifakso [Syfax], princo de Numidio, tiamaniere ruinigante ties kontrakton kun Romo, farita de Scipio.

Tiu, konsciante pri sia alta celo ne cedigi la roman gloron, ne estis timigebla. Post kiam li devigis la urbon Lokroi kapitulacii, li transŝipis al Afriko kaj albordiĝis proksime de Kartago kun 36.000

legianoj. Ĉe Tunes [Tunizo] li instalis fortikan bivakon (204). De tie li sieĝis la urbon Utika, reciprokaj surprizatakoj ŝanĝis je intertraktado, ĝis kiam okazis batalado sur la "grandaj kampoj", sukcesinta multfavore al Scipio (203). Sifakso forkuregis, kaj Hasdrubalo malaperis senlaŭte kiel ĉasata leporo.

Nun malespero regis la Kartaganojn, kiuj laŭeble devis akcepti la packondiĉojn de Scipio, kiuj vere estis teruregaj. Sed ili ne rezignis; ili memoris pri Hanibalo, kiu sidis en Italio nevenkite, senage.

Nenian sciigon Hanibalo perceptis pli forte ol hejmenveturi kaj savi la patrujon. Dum la vintro 203 al 202 li revenis kun 15.000 soldatoj kaj prenis kvartiron en la urbo Hadrumetum. Dum la sekvintaj semajnoj li pligrandigis sian armeon, fine ampleksanta 40.000 militistojn.

Kompreneble paco preparota interrompiĝis. La fama venkinto de Kanno - tuta Kartago esperis tion - turnus la sorton. Longdistance de Kartago ambaŭ armeoj kontraŭtrafis por akiri la decidon, proksime de la urbo Zama. Certe Hanibalo superis Scipion laŭkvante (je 40.000 viroj), sed tiu armeo estis kunstoplita amaso, al kiu disciplino mankis, kaj Scipio komandis bone trejnitan popolarmeon. Hanibalo, evidente vidante tian malekvilibron, serĉis intertraktadon kun Scipio, kiu rifuzis.

Tiel la malfeliĉo kuris. Fatala miskompreno inter la kartaga armeo instigis la antaŭajn liniojn batali kontraŭ la malantaŭaj, supozitaj perfidemuloj; Hanibalo uzis sian rajdistaron piede batali kontraŭ la roma kavalerio, kiu perforte malsuprenigis la senĉevalajn rajdistojn, Brave bataladante, tiuj estis atakitaj je la dorsflanko kaj suferis masakradon. 20.000 el ili estis mortigitaj. La resto iris en kaptitecon. Sole Hanibalo povis eskapi, akompanite de malmultaj fideluloj. Kompleta decidvenko de Scipio, kiu nun staris antaŭ Kartago.

La packondiĉoj, al kiuj Kartago devis sin submeti, estis frakasaj: el la fiera milita ŝiparo restis dek ŝipoj, la aliaj estis liverendaj al la Roma Respubliko. Ĉiuj eksterafrikaj teritorioj (Hispanio, Sicilio, Sardinio) estis apartigataj. La kontribucioj sumiĝis je 10.000 talantoj pagendaj dum 50 jaroj.

Militon Kartago povis fari nur laŭ roma permeso, kaj tiu sole en Afriko; en transmediteraneaj regionoj la militoj estis absolute malpermesataj. Por garantii, ke Kartago ne rompu la kontrakton, ĝi devis liveri cent ostaĝojn al Romo. Tiel la iama plenglora, riĉega Kartago fariĝis klienta ŝtato de Romo, kiu sin pretigis pli kaj pli esti la sola plenpotenca ŝtato al la Mediteraneo.

5. Lia provo savi Kartagon

Fuĝinte post la malvenko de Zama, Hanibalo povis vivi senzorge kaj ripozeme, ĉar siajn bienojn li ja ne perdis same kiel ĉiuj kartagaj nobeloj. Sed liaj fiero kaj vivtenado ne permesis tian agadon. Tiom pli li nun volis servi al sia gepatra urbo, falinta en mizeregan, abisman staton.

Laŭ tradicia sciigo li, enmiksiĝante en politikaĵojn, rekomendis akcepti la romajn kondiĉojn; eble li pensis, dum sekvontaj jaroj tiujn plimildigi aŭ tute nuligi per nova milito. Sed kiu scias? La venĝopensoj kontraŭ Romo profunde fosiĝis en sia brusto kaj ne lasis lin ripozi.

Sed tio ne estis lia ununura problemo. Pli obstakle montriĝis lia fremdeco en la gepatra urbo, kie li devis regajni la reputacion de sia familio Barkas. Ĉar tie ekzistis malamikoj, kiuj riproĉis al li, ke li kvazaŭ kaŭzis la pereon de Kartago, ĝis kiam oni memoris pri lia glorkronita venko de Kanno. Precipe la komuna popolo fidis al li kaj esperis, ke li rekonduku la tempon de Kanno.

Portita de tiu konfido, li forte engaĝiĝis pri la urboŝtato. Li eĉ akiris la plej altan oficon, kiam en 196 oni elektis lin kiel sufeto, sed ne la nobelaro vokis lin, tion faris la komuna popolo. Nun deĵorante li plenumis reformojn por resanigi la ŝtaton. Unu reformo koncernis la administradon, kiam li aboliciis la ĉiamajn oficojn de la juĝistoj kaj de la senato de la 104 viroj. Instigite de li, nova leĝo destinis, ke kaj juĝistoj kaj la senatanoj ĉiujare denove estis investitaj, resp. ili alternis. Alia leĝo destinis, ke la sufetoj estis vokitaj en sia ofico ne de la nobelaro, sed de la tuta burĝaro. La sufetecon Hanibalo eluzis por reformi la impostoprenadon. Ĉar la porromaj kontribucioj ŝarĝis forte la ŝtatan buĝeton. Liaj aranĝoj efikis, ke malgraŭ tiu troŝarĝiteco la unuopa burĝo ne estis tro

premata. La impostoŝarĝon li dispartigis egalrajte. Ŝajnis ke la genia militestro ŝanĝiĝis al same genia politikisto.

Sed la sorto - pli bone dirite: la malico de la reganta klaso de la nobelaro - krucigis ĉi tiun evoluon. La nobelaro, envia je liaj sukcesoj, timis ke li strebos al tiraneco. Ĉar, subtenata de la granda popolamaso, Hanibalo eble perforte povis regi kiel aŭtokrato, kiu forigus la nobelaran potencon.

Unuapaŝe la kartagaj nobeloj serĉis helpon ĉe la romaj samklasanoj, kiuj preteme konsentis. Tiel delegacio venis de Romo por laŭŝajne solvi problemojn, ekestintajn je Masinissa, reĝo de Numidio. Hanibalo antaŭvidis danĝeron kaj, post finiĝinta sufeteco, fuĝis nerimarkite el Kartago al Thapsus, kie li posedis kelkajn bienojn (195).

6. Liaj fuĝo kaj mortfino

Tiu fuĝo nun komencigis lian lastan vivepokon, kiu unue favorigis lin, ĉar li ankoraŭ strebis kontraŭbatali sian malnovan malamikon Romo kaj regajni la potencon super Kartago.

Ĉar en Thapsus li sentiĝis danĝerigita, li plue velŝipis orienten al la fenika originurbo Tiruso [Thyros]; tie regis reĝo Antioĥo de Sirio. La enloĝantoj akceptis lin entuziasme, kiel la faman venkinton de Kanno. Ĉar tie Antioĥo ne troviĝis, sed deĵoris en Efezo [Ephesus], Hanibalo sekvis lin tien, kie li estis bonvenigita de la reĝo kun ĉiuj honoroj konvenaj al plenglorulo. Tiu serĉis en li amikon, batalante kontraŭ Romo, kaj li nun havis ne nur agrablan gaston sed ankaŭ kunbatalanton. Kvankam Antioĥo ĉefe celis pligrandigi sian regnon je Egiptujo kaj Makedonio, li tamen intencis encirkli Romon laŭ bone iniciatita plano. Pri tio Hanibalo povis asisti lin, des pli multe ĉar ŝajnis, ke Romo, kiu tiam ĵus retiris sian truparon el Grekujo, estis malfortigita, kaj multfojaj ribeloj minacis Romon.

Hanibalo, vidante vojon returni al sia gepatra urbo, kontaktiĝis tiamaniere. Sed Kartago rifuzis lin, kaj Antioĥo fine perfidis lin, malinklina al tia riska plano. Kvankam li Romon ne ŝatis, finfine Hanibalo ĝenis lin - pli ol la roma potenco. Antioĥo suspektis la ambiciojn de Hanibalo. Kiam tiu pensis, ke militiro kontraŭ Romo

ne estus evitebla, duobla misfortuno okazis. Ŝiparo, sendita el Tiruso al Antioĥo por subteni lin, renkontis antaŭ la bordo de Malgrandazio grandan eskadron de romaj ŝipoj. La ekestanta marbatalado decidis la militaferon; ĉe Magnesia tio okazis je kompleta venko de Romo (190). Antioĥo devis cedi kaj fordoni ĉiujn konkeraĵojn kaj - kompreneble - Hanibalon.

Sed malsukcesis tia fiagado. Hanibalo, suspektante malbonan militfinon, fuĝis el Efezo al la urbo Gortyn sur la insulo Kreta kaj de tie al reĝo Artaksias de Armenio, kiu ne estis subigita al Romo.

Ĉar ripozado ne konformis al sia venĝema karaktero, kaj serĉante eblecon kontraŭagi la Romanojn li foriĝis al reĝo Prusias de Bitinio (eble 188), kiu ne sole kontraŭmilitis siajn najbarojn sed ankaŭ Romon. Kompreneble Romo devigis la kontraŭulojn de Prusias alianciĝi kun ĝi.

Hanibalo nun montriĝis lastfoje kiel elstara militestro. Sekve de marbatalo laŭ lia ruzkomando oni ĵetis oleokruĉojn sur la malamikajn ŝipojn, kie ili krevis kaj la oleo verŝiĝis, sorbigante la trabojn. Poste brulantaj sagetoj, pafataj sur ilin, efikis kolosan fajraĵon, tiel ke la tuta ŝiparo brulneniiĝis je la ĝojo de reĝo Prusias. Malgraŭ ĉi tiu venko la militiro finis malbone por li. En 184 lia plej eminenta kontraŭulo Eumenes de Pergamono lin militbatis tiel forte, ke li devis cedi.

Certe por Prusias la kontrakto, farita dum somero 183, ne estis tro humiliganta; sole li devis agnoski la roman regnon super si. Nur por Hanibalo la fino estis destinata, ĉar Romo postulis lian transdonadon. Prusias, ne riskanta rifuzon kontraŭ la grandpotenca Romo, allasis ke sia amiko estis arestita.

Sed tio ne okazis. Hanibalo, por eviti malnoblan finon de sia vivo, prenis venenon. Kiam la arestistoj iris en lian loĝejon en la urbeto Libisa [Libyssa], ili trovis nur mortinton. La venĝo de Romo kontraŭ la persista malamiko malsukcesis. Kiel heroo Hanibalo malaperis el mondo (aŭtuno 183), kiu malaprobis lian gloron, lian grandiozecon.

Kvazaŭ la sorto volus kunigi la iamajn kontraŭulojn, samtempe mortis P. Cornelius Scipio, nun nomita "Africanus", en sia kampara bieno, situanta en la itala provinco Kampanio. Ankaŭ li

forlasis la mondon, malaprobite. Romo ne toleris viron, kiu famiĝis - nek la propran venkinto de Zama, nek la poreterne glorkronitan de Kanno.

7. La aprezo laŭ la historio

La tiamaj samtempuloj de Hanibalo ne tre cerbumis pri la agado. Ĉar la jarcentoj, kiuj sekvis jenajn militajn eventojn, apartenis al mondo, kiu estis penetrata de la roma epoko - politike kaj civilizacie. Do, estas klarigeble, ke la posteularo forkritikis ĉiun lian bonan econ. Nome la romaj historiistoj, precipe T. Livius, ne hontis verdikti lin kruela, plena je malhumaneco, malpia. Ili vidis lin sole kiel potencavidan tiranon, por kiu homo validis ne pli ol muŝo. Por Romo Hanibalo estis nur la pereiganto de ĝia ĉiopotenco. Por Romo li personigis la kartagan spronon en sia imperio, kronata de la sentenco, dirata poste de Cato, la senatoro: "Ceterum censeo, Carthaginem esse delendam" (Cetere mi opinias, ke Kartago estas detruenda).

Sed la kontraŭargumenton, la kontraŭverdikton la historio jam delonge esprimis per unu nocivorto: tekstanta Kanno. Kial tiam Hanibalo kontentiĝis venkegi la roman legian armeon kaj ne provis konkeri la urbon Romo mem? Ĉu li timis, ke Romo ne agoniĝis, ke ĝi ne estis subigebla? Ne supozeble por tia geniulo. La prezentita kaj rifuzita armistico pruvas ion tute alian. Mense kaj el sia politika vidpunkto li ne dediĉis sin al la potenco-strebado, kiu distingis la roman regavidon. Lia politiko estis, ke ĉiu urbo - aŭ greka, aŭ fenika, aŭ roma - memstariĝis kooperative kun aliaj. Certe li celis al kartaga hegemonio, precipe laŭ ekonomia kaj komercaj vidpunktoj. Romon detrui, tion li ne planis; li vivis en la antikva idearo de la urboŝtato, plej evidente efikita de la grekoj kun iliaj ŝtatoj de Ateno, Sparta kaj aliaj.

Kaj kie prezentiĝas lia krueleco kaj lia malestimo de la homa digno? Certe li agis kruele, kiam la jaroj post Kanno devigis lin, rigore subigi la urbojn en Apulio kaj bruligi ties grenkampojn. Liaj subuloj, liaj soldatoj lin konis nur kiel mildan, ekzemplodonan komandanton, kiu ne ĝenis antaŭeniri en ĉiu danĝero, en ĉiu batalo.

Certe la sklaveco laŭ moderna vivkoncepto vere malestimis la homojn, simple vivantajn. Sed ne estas la kulpo de Hanibalo, ke la tuta antikva mondo traktis ilin kiel bestojn.

Sed plej forte lia spirito postvivas en lia militarto. En Kanno tio montriĝas evidente. La ideo, preni la kontraŭstarantojn encirkligante ilin kvazaŭ en tenajlon estis unue ekkaptita de li, tiel ke ĝi estas ĝis la nunaj tagoj aplikata de eminentaj militestroj multfoje; ĉiam la modelon liveras la fama kartaga militestro.

Kronologio de Hanibal

814 a. K. laŭlegenda fondiĝo de Kartago helpe de la reĝidino Dido.

264-241 la unua Punika Milito de Romo kontraŭ Kartago.

247/246 naskiĝas Hanibalo Barkas, unua filo de Hamilkaro Barkas.

226 Ibero-kontrakto inter Hasdrubalo kaj Romo

221 Hanibalo fariĝas komandanto de la kartaga armeo en Hispanio.

219 Romio deklaras militon kontraŭ Kartago; komenciĝo de la Dua Punika Milito. Hanibalo transiras la riveron Hibero.

218 Hanibalo transpaŝas kun sia armeo la alpojn (en aŭtuno) dum 15 tago. Li venkas la roman armeon, komandata de *P. Cornelius Scipio major* ĉe la rivero Ticino. Dua venko de Hanibalo ĉe la rivero Trebia (en decembro).

216 Venkega encirkla batalo ĉe Kanno (2a de Aŭg.). Neniigo de la romia armeo.

202 Batalo ĉe Zama. P. Cornelius minor venkas Hanibalon. Fino de la Dua Punika Milito.

196 Hanibalo fariĝas sufeto en Kartago.

195 Hanibalo fuĝas, unue al Thapsus, poste al reĝo Antioĥo de Sirio.

188 Denove Hanibalo fuĝas, nun al reĝo Artaksias de Armenio, de tie al reĝo *Prusias* de Bitinio

183 Hanibalo mortigas sin per veneno en Libisa por eviti areston.

Glosaro

Antioĥo: (t.e.) Antioĥo III., la Granda (nask. 242, mort. 187, regn. 223 - 187), ido de Seleŭkos, generalo de Aleksandro, la Granda. Li konkeris partojn de Malgrandazio, sed fine rezignis kontraŭ Romo.

Armenio: Reĝlando sude de la montaro Kaŭkazo etendiĝanta en la orienta parto de Malgrandazio sur altebenaĵo. Ekde 190 ĝi memstariĝis, sub protektado de Romo.

Bitinio (*Bithynia*): Memstara lando en la nordokcidenta parto de Malgrandazio.

Centurio (centuria): Batalunuo de la roma armeo, origine konsistanta el cent soldatoj (aŭ legianoj), poste el 60. Ĝin komandas la centuri(estr)o, lat. centurio.

Etruskoj: Gento vivanta ĉe okcidenta marbordo de Italio. Ilia regno etendiĝas ĝis la montaro de la Apeninoj orienten. En la sudo ĝin limigis ĝis ĉ. 600 aK la rivero Tibero, en la nordo la rivero Arno. Ĝi konsistis el 12 urboŝtatoj. Origine ankaŭ Romo apartenis al la urbaro, ĝis kiam ĝi sendependiĝis (ĉa. 575 aK).

Fenikoj (fenicoj): Semiddevena gento, vivanta ĉe la orienta marbordo de Mediteraneo en la nunaj ŝtatoj Libano kaj Izraelio. Per ilia komerco ili regis la tutan Mediteraneon; tion precipe prizorgis la ĉefa kaj origina urbo Tiruso (*Thyros*). Tiu estis urboŝtato same kiel Kartago.

Gallio: Parto de Okcident-Eŭropo (hodiaŭa Francujo) kaj laŭ la roma tradicio en norda Italio, loĝata de multaj keltaj triboj memstaraj, postea romia provinco. La ĉefan, pli grandan parton en hodiaŭa Francujo konkeris *G. Julius Caesar* 58 - 51 aK.

Ilirio (*Illyria*): Regiono resp. roma provinco ĉe la norda kaj orienta marbordoj de la Adriatika Maro, montareca, enhavanta proksimume la hodiaŭan ŝtaton Kroatujo kun apudaj teritorioj.

Keltoj: Hind-eŭropa popolo konsistanta el diversaj gentoj, je roma tempo plejparte memstaraj, escepte de Gallio. Ili loĝis en hodiaŭaj Francio, Britio, Irlando, suda Germanio kaj norda Italio.

Konsulo: La plej altranga oficisto de la Respubliko Romo. Ĉiujare du konsuloj estis elektataj de la senato (konsilio de la aĝuloj), kaj ili regis la ŝtaton dum unu jaro.

Makedonio (Macedonio): ŝtato sur la balkana duoninsulo norde de Grekujo kun greksimila en loĝantaro, regata de reĝoj. La plej eminenta estis Aleksandro la Granda (356 - 323 aK). Je la hani bala epoko ĝi estis ankoraŭ memstara, kvankam la romianoj strebis subigadon, kio fine okazis 148 aK.

Numidio/numidoj: Ŝtato resp. popolo okcidente de Kartago en hodiaŭa Alĝerio. Dekomence - ankaŭ dum la hanibala epoko - ĝi estis memstara reĝlando. Masinis(s)a estis la plej konata reĝo. Ekde 40 aK ĝi fariĝis samnoma roma provinco.

Pentero: Granda militŝipo, remata de ĉ. 300 viroj, sidantaj en kvin vicoj.

Publius Cornelius Scipio: Romia militestro kaj konsulo de 218.

Publius Cornelius Scipio (maior) Africanus: Lia filo, venkinto de *Zama*. Konsulo de 205 kaj 194 aK. Li mortis 183 aK.

Semidoj: Popoloj, vivantaj ĉe la orienta bordo de Mediteraneo trans la riveroj Eŭfrato kaj Tigris, sur teritorio etendiĝanta ser la tuta Araba Duoninsulo. Gravaj popoloj estas la araboj, judoj resp. israelanoj kaj dum antikvo la fenikoj.

Senato de la 104 viroj: Tribunalo plejpotenca de la urboŝtato Kartago. Ĝi konsistas el senatanoj, kiuj estas elektataj dumvive. Per sia reformo Hanibalo faris, ke la dumviva ofico estis anstataŭita de ĉiujara ofico de juĝistoj (190 a.K.). La plilongigo estis nun ne ebla.

Sufeto: unu de la du plej altrangaj supremaj funkciuloj en la antika Kartago, simile al la konsulo en Romo.

Talanto (*talentum*): Mezurunuo de pezo kaj monunuo, ĝenerale - laŭ la atika arĝenta talanto - ĉ. 25,92 kg je bloko.

Triero: Remata militŝipo kun sprono ĉe la pruo por batpuŝi antaŭan ŝipon traborante. La vorto triero signifas 'triremo' (tri vicoj da remistoj translokigitaj unu super la alia), sed kiom da remistoj ĝin remis, oni ne scias precize (verŝajne ĉ. 170 remistoj kaj entute ĉ. 200 maristoj).

Literaturo

1. Karl Christ (eld.), *Hannibal* [Vojoj de la esploro Vol. CCCLXXI] *(Wege der Forschung),* 1974, Wissenschaftliche Buchgesellschaft, Darmstadt.
2. Wilhelm Hoffmann, *Hannibal,* 1962, Vandenhoeck & Ruprecht, Göttingen.
3. Werner Huss, La Kartaganoj *(Die Karthager),* 1990, C.H. Beck'sche Verlagsbuchhandlung, München.
4. Gisbert Haefs, Hannibal - la romano de Kartago *(Der Roman Karthagos),* 1989, Hoffmanns Verlag AG, Zürich.

"Hanibalo, la Kartaga Militestro - Vivo de Hanibalo Barkas kaj la Historio de Kartago" estas parto el la originala esperantlingva verko "Skizoj kaj Fragmentoj el la Historio".

Adreso de la autoro:
Gerhard KALKHOF
An der Ritsch 17
DE 36341 LAUTERBACH
GERMANIO

Postrimarko: en konsento kun la tekstrevizianto mi uzis lau PIV analoge al Romo la vortojn Romano, romana kiam rilatas al la antikva Roma Republiko [*res publica*] (responde al Kartago, Katargano, kartagana) -

kaj ne la vortojn Romio, Romiojn, romia reprezentante pli bone la imperiestran imperion ekde Augusto [*Imperium Romanum*].